Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 30-an de majo 2024 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo.** La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 18-an de aprilo 2024**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis, kun aldono de citiloj en la punkto pri Uhlen.

**3. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko**
Ni prokrastas la aferon ĝis la venonta kunveno, atendante respondon de la Nacia Biblioteko

**4. Pri la mono de NJE**
NEL transprenis monon apartenantan al NJE, kiu nuntempe estas dormanta organizo. Jure la mono de NJE estas la mono de NEL, ĉar NJE ne estas registrita en Brønnøysundregisteret. Ni transmetos la monon al alia bankkonto kun pli da interezo.

**5. Valoro de Esperantonia**
Claude atentigis la revizoron, ke indikante la valoron de Esperantonia en nia jarkalkulo ni uzas la valoron, indikitan de Skatteetaten.

**6. Peto al Uhlen por Norvega Esperantisto**
Ni aprobas la ideon peti monapogon de legaco «Uhlen» por kolora eldono de Norvega Esperantisto. Ni diskutos la petleteron kiam Claude estos verkinta ĝin.

**7. Ekstera informado de NEL**
Ni agnoskas la neceson vigligi nian retpaĝaron. Ni klopodu ofte (almenaŭ ĉiumonate) plublikigi ion novan, pri temoj norvegaj kaj internaciaj. La retpaĝaro enhavu novaĵojn kaj bazajn informojn, ankaŭ noticojn de Norvega Esperantisto kaj Esperanto-nytt. Ni aperigu informojn pri Vipps kaj pri la maniero aboni al la novaĵletero. Prefere la novaj publikaĵoj aperu supre (supre de la ĝenerala teksto) kaj ŝoviĝu malsupren, kaj ili laŭeble estu akompanataj de fotoj. La fona bildo estu pli malalta ol nun, por ke oni bone povu aliri la novaĵojn. La retpaĝaro estu interesa ankaŭ por neesperantistoj, kaj kiam necesas prioritati, ni prioritatu la kvaliton de la norveglingvaj materialoj. Estu novaĵetoj de la Esperanta mondo, ni montru Esperanton kiel vivantan aferon, kaj NEL kiel parton de tiu vivo.

**8. Stato de vortaro**
La daŭrigon de la vortara laboro oni decidis diskuti en baldaŭa klubkunveno en Trondheim. Jardar resumos en la venonta estrarkunveno.

**9. Jarraporto 2023**
Prokrastata.

**10. Eventualaĵoj**
Bård respondos al letero de Renato Corsetti (UEA), sendita al la landaj asocioj.
Ni sendu la lernolibron «Esperanto – den direkte metoden» al la kursanoj kaj petu ilian opinion pri ĝi.

**11. Venonta estrara interkonsiliĝo** okazos ĵaŭdon la 22-an de aŭgusto 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund